

# BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO



2

SOFIA — FEBRUARO 1961

## ENHAVO

	Paĝo
* * * — Ni konstruas . . . . .	1
<b>Iv. Sarafov</b> — Niaj kursoj . . . . .	2
<b>C. Murgin</b> — La agado de la komunistaj esperantistoj en 1919—1923 . . . . .	3
<b>I. S.</b> — Panajot Kulev — redaktoro de „Bulgara esperantisto“ 1919—1924 . . . . .	4
<b>Maksim Gorkij</b> — Ĉu Esperanto estas utopio . . . . .	6
BELETRO KAJ POEZIO . . . . .	7
<b>T. Lakova</b> — La oka de marto . . . . .	8
* * * — Pri la historio de MEM . . . . .	9
<b>D-ro T. Todorov.</b> Ultravioleta radiado . . . . .	10
* * * — Niaj taskoj . . . . .	11
ORGANIZA VIVO . . . . .	13

*Abonkotizo: jara — 14 levoj, duonjara — 7 lv. Por eksterlando — 2 dolaroj aŭ egalvaloro.*

*Reklamtarifo: 5 levoj por cm<sup>2</sup>; korespondanoncoj: 0.5 levoj por ĉiu vorto. Eksterlandaj adresoj publikigataj senpage. Ekstera kovrilpaĝo — 1000 .v.*

### LANDAJ REPRESENTANTOJ DE „BULOARA ESPERANTISTO“

**ALBANO:** Ing. Cefo Fico, 44 Rruga Stafa, Tirane.

**ITALIO:** Julia Franceschi, via A. Boito 6, Padova

**KOREO:** Korea Esp. Asocio. Pjeng' jang P. O. kesto 16.

**NEDERLANDO:** Ru Bossong, Floraplein 23, Eindhoven.

**RUMANIO:** Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, Bucuresti 5

**SOVETUNIO:** J. Kudrjavickij, PK 1255, Moskva K-9.

**SVEDIO:** Karl Kvist, Deje, Box 109—a.

**Frontpaĝa foto: Hotelo „Trimoncium“ — Plovdiv**



## NI KONSTRUAS

La tria kvinjara plano estas realigita en tri jaroj — informis nin antaŭ kelkaj tagoj la Centra Oficejo por Statistiko. Mallonga sciigo, signifanta grandiozan laboron, faritan de milionoj da laboristoj kaj kamparanojen nia lando.

La kvinjara plano realiĝis danke la inspiran kaj gvidan rolon de la Bulgara Komunista Partio, danke la fratan helpon fare de la soveta popolo kaj de la popoloj de la ceteraj socialismaj landoj.

Kiel rezulto de la tutpopola partopreno en la socialisma konstruado dum la lasta jaro ekflamis la kamentuboj de la cementfabriko „Wilhelm Pieck“, ekfunkciis la maŝinoj kaj la torniloj de kelkaj novaj metalurgiaj entreprenoj kaj de la akumulatora uzino „Metodi Satarov“. La gorgoj de kelkaj novaj minejoj eljetas grandajn kvantojn da kupra, plumba kaj zinka ercoj. Potencaj turbinoj produktas elektron por urboj kaj vilaĝoj. Dum la pasinta jaro la agrikulturaj kooperativoj dank'al agrikulturaj maŝinoj akiris pli grandajn kvantojn da greno ol kutime. Pli abunda estis la viando kaj la lakto. Pli bonkvalita estis la lano kaj la koton.

Pli forta estiĝis la giganto de la bulgara popolo — ĝia laborista klaso kies nombro de la membroj plialtiĝis per 125,877. Samtempe plialtiĝis la reala salajro de laboristoj kaj oficistoj.

Ĝirkaŭ 6,000 junuloj ricevis diplomojn de inĝenieroj, kuracistoj, instruistoj k. a. Pli da varoj estis liveritaj al niaj komercaj entreprenoj. Miloj da familioj ricevis novajn loĝejojn. Tia estas la bildo de la socialisma konstruado, lasita al ni de la lasta jaro. Kiel evidentiĝas jam en januaro, la plano por la kuranta jaro realiĝas sukcese. Tio estas pruvo, ke dum la kuranta jaro nia lando estiĝos ankoraŭ pli riĉa, nia popolo — pli bonstata.

Nia peza industrio ricevos novajn entreprenojn: proksime de Sofia oni masonas la murojn de la granda Metalurgia entrepreno „Kremikovci“; Inter Ploudiv kaj Sofia oni finkonstruas la gigantan tandejon por plumbo kaj zinko. La nova minejo „Martinovo“ ĉiutage liveros po 1,000 tunojn da erco.

Dum la kuranta jaro nia laborista klaso atingos novajn sukcesojn en la modernigo de la mekanismoj por plialtigo de la produktado kaj per tio ĝi ŝparos monrimedojn kaj materialojn.

La fervojo Sofia — Ploudiv, longa 156 klm. dum la kuranta jaro estos ekspluatata per elektraj lokomotivoj. En la antikvaj montoj Rodopo, laŭ la volo de la bulgaraj masonistoj, ekbrilos la bluj akvoj de nova artefarita lago.

Entute dum 1961 funkcios 213 industriaj entreprenoj kaj per tio nia popolo metos sian brikon en la konstruon de la paca vivo.

La bulgaraj esperantistoj fervore partoprenas en tiu nobla, krea laboro kaj ili volonte rakontos pri ĝi al siaj multnombraj amikoj tra la mondo.

## NIAJ KURSOJ

La 34-a kongreso decidis, ke ni devas speciale klopodi pri la disvastigo de Esperanto inter la junularo. Kaj tio estas tre necesà, çar sen entuziasmo kaj neelçerpebla energio de la gejunuloj la Esperanto-movado ne povas ekzisti.

Çiuj scias, ke la kursoj estas fonto por varbado de novaj adeptoj, por plimultigo de la organizitaj esperantistoj. Ni havas jam dokumentojn, kiuj kunhelpas nian agadon. La kursoj devas esti malfermataj en kunlaboro de la lokaj esperantistaj societoj kun la Sindikatoj, Komsomolo kaj Kulturdomoj.

Plemumante le kongresajn decidojn la societaj estraroj en diversaj urboj kaj vilaĝoj komencis viglan agadon. Oni malfermas multnombrajn kursojn. La instruadon oni komisiis al la plej bone preparitaj kamaradoj, kiuj plej altgrade posedas la lingvon en la koncerna loĝloko. La kursoj mem povas esti utiligataj por la eduko de çiam pli spertaj kursgvidantoj. La praktiko estas la plej bona instruisto.

Por atingi siajn celojn la kursoj devas esti anticipe bone preparitaj. La societaj estraroj devas bone antaŭprepari la grundon kaj bone organizi la kursojn. Speciala estrarano, kiu respondecas pri la kursoj, devas viziti de tempo al tempo la kursojn, helpi per çiuj disponeblaj manieroj la kursgvidantojn, kuraĝigi la kursanojn. Jam forpasis kvin monatoj de post kiam komencigis la novaj kursoj kaj ni jam devas analizi ties laboron.

Estas senduba vero ke la çefa kaŭzo por la bona kaj sukcesa funkciado de la kursoj troviĝas en la manoj de la bonaj kaj spertaj kursgvidantoj. Sen ili ni ne povas rikolti sukcesojn. Sed la kursgvidantoj kaj la kursanoj devas esti provizataj per konvenaj kaj metodike bone verkitaj lernolibroj kaj aliaj lernhelpiloj. Nun ne estas troveblaj lernolibroj, vortaroj kaj aliaj lerniloj.

**La movado troviĝas en provizora krizo.** Ni ne venkos baldaŭ la krizon por lernolibroj kaj vortaroj pro tio ni devas nin akomodi al la kriza stato. Ekzemple oni devas serçi malnovajn lernolibrojn kaj vortarojn kaj parte kontentigi la bezonojn. Oni povas gvidi eç kursojn sen lernolibroj, kies efektivigo estas treege malfacila, tamen ĝi estas efektivebla.

La societaj estraroj devas streçi siajn fortojn kaj dediçi siajn kapablojn al la bona organizado kaj funkciado de la kursoj, al helpo de la kursgvidantoj. La kursgvidantoj mem çiam devas strebi al metodika plibonigo de sia instruado. Ili devas esti ne nur bonaj instruantoj, sed ankaŭ bonaj organizantoj. Ili devas varbi iom post iom la gekursanojn al nia organizaĵo en la daŭro de la kurso mem. La kursoj ne devas daŭri malpli ol 50 lernehorojn aŭ 25 lekciojn po 2 lernehorojn. La kursgvidantoj devas bone prepari siajn lecionojn laŭ la nuntempaj instrumentoj, en ligo kun la vivo.

La societaj estraroj speciale devas zorgi pri la kursgvidantoj. Ili estu kontentige rekompencataj konforme al ilia sperto kaj kvalifiko. Ili ne estu ŝargataj per alia laboro por havi sufiçe da tempo por bona preparo de la lecionoj. Tiamaniere estas garantiataj pli sukcesaj kaj rezultoplenaj lecionoj.

Grava tasko de çiuj societaj estraroj kaj spertaj esperantistoj estas per amikaj renkontiĝoj, interparoloj ktp. varbi novajn kursanojn, ilin membrigi en la lokaj societoj, krei kondiçojn en novaj najbaraj loĝlokoj por malfermo de kursoj kaj fondo de novaj societoj.

Laborante tiamaniere trankvile, saĝe kaj sindone ni sukcesos krei novajn pionirojn de nia movado, ni kreos indan taçmenton, kiu sukcese pluportos la verdan torçon ĝis la fina venko de nia lingvo.

Ivan SARAFOV



## LA AGADO DE LA KOMUNISTAJ ESPERANTISTOJ EN 1919—1923

Preskaŭ en la fino de la Unua Imperiisma Mondmilito malfermiĝis nova paĝo en la historio de la homaro — venkis en Rusio la Granda Oktobra Socialisma Revolucio (1917). La ekzisto mem de la unua socialisma ŝtato en la mondo influis kuraĝige al la progresemaĵoj socifortoj en ĉiuj landoj. La revolucia doktrino de marksismo-leninismo spertis faman diskonigon tra la tuta mondo. Ĝi penetris eĉ la vicojn de la malgrandaj „neŭtralaj“ kaj kulturaj organizaĵoj, kiaj estis tiutempe la esperantistaj.

Bulgario ne faris escepton tiurilate, ĉar, ĝi estis loko, kie okazis tre intensaj klaskonfliktoj kaj ideologiaj bataloj. La insistaj kaj senlacaj klopodoj de la Bulgara Socialdemokrata Partio (revoluciaj socialistoj) estis rekompencitaj per rapida kresko de ĝia influo en nia lando. Laŭ siaj mondkonceptoj la partio de la revoluciaj socialistoj estis tre proksima al la Komunista Partio de Sovetunio. Ĝi estas unu el la fondintoj de la III-a Komunista Internacio. La teoria nivelo de ĝiaj ordinaraĵoj membroj estis sufiĉe alta. Estas do penio miriga en tio, ke tuj post la milito en nia lando ekzistis kaj agadis en granda skalo konsiderinda grupo da komunistaj esperantistoj. Ĝia tasko estis duobla — propagandi Esperanton inter la komunistoj kaj diskonigi la komunismon inter la esperantistoj. La aktiva partopreno de la komunistaj esperantistoj en la postmilita restarigo kaj disvastigo de la Esperanto-movado stabiligis ilian aŭtoritaton inter la esperantistoj. Per sia vigla agado ili kontribuis ankaŭ al la streĉa liberiga batalo de nia popolo kontraŭ la kapitalisma sistemo.

Unu el la elstaraj komunistaj esperantistoj estis Panajot At. Kolev. Li partoprenis seninterrompe en la redaktaj komitatoj de la unuaj kvin jarkolektoj de „Bulgara Esperantisto“ (de julio 1919 ĝis junio 1924). Elsub lia plumo aperis multaj artikoloj kaj informaĵoj, kiuj grave kontribuis pri la idea kaj eduka hardigo de la progresemaĵoj esperantistoj. Dank’ al lia insistado en la regularo de la redakta komitato estis sankciita paragrafo kiu „permesas publikigon de informoj pri politiko kaj religio, se ili estas ligitaj kun la propagando de Esperanto“ („BE“, jaro II, n-ro 4 de februaro 1921). En „Bulgara Esperantisto“ (jaro III, n-ro 3 de novembro 1921) oni aperigis koncizan, sed sufiĉe klaran resumon de klasbatala rezolucio de la I-a kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), en kiu estas dirite, ke SAT „invitas ĉiujn proletajn esperantistojn, ke ili anstataŭ agadu en burĝaj aŭ neŭtralaj Esperanto-organizaĵoj, unuigu sin en la komunista Esperanto-organizaĵo“. En la komenco de 1922 P. Kolev farigis peranto de SAT („BE“, jaro III, n-ro 5 de januaro 1922). Iom poste estis fondita Komunista Esperanto-Grupo „Balkana Liberiga Stelo“ en Sofio („BE“, jaro III, n-ro 6 de februaro 1922). Ĝi estis sankciita de Centra Komitato de Bulgara Komunista Partio. Inter la rekomenditaj Esperanto-gazetoj de la IX-a kongreso de la bulgaraj esperantistoj 1922 estis ankaŭ „Sennacieca Revuo“ — oficiala organo de la klasbatala tiamá Esperanto-organizaĵo—SAT. En la kadro de la sama kongreso okazis oficiale anoncita de „Bulgara Esperantisto“ privata kunveno de la komunistaj esperantistoj (aŭgusto 1922, adreso: str. Veslec 10, Sofio).

Antaŭ la supre menciita landa Esperanto-kongreso la Komunista Esperanto-Grupo „Balkana Liberiga Stelo“ aperigis bulgarlingvan 64-paĝan propagandan broŝuron „La Internacia Lingvo kaj la laborista klaso“, kies enhavo ne perdis sian aktualecon eĉ nun kvankam forpasis jam preskaŭ kvar jar-

dekoj. Ĝia aŭtoro estas P. Kolev. „Bulgara Esperantisto“ dufoje atentigis pri la broŝuro. La unuan fojon ĝi heroldis pri ĝia apero kaj donis koncizajn informojn pri ĝiaj enhavo, eldonanto, prezo kaj livero. La duan fojon la revuo enhavis favoran recenzon pri ĝi. Interalie oni legas: „En tiu ĉi libreto oni traktas la demandon pri la Internacia Lingvo kaj ĝia signifo por la laboristaro, el vidpunkto komunista. En tiu ĉi rilato la verko laŭ la ideo kaj formo estas komplete modela...“ („BE“, jaro III, n-ro 8-9 de aprilo-majo 1922 kaj jaro IV, n-ro 1-2 de septembro-oktobro 1922).

Unu el la fontoj el kiuj la Komunisto Esperanto-Grupo „Balkana Liberiga Stelo“ ĉerpis sperton, estis la sovetia Esperanto-gazetaro. En 1921, ekzemple, ĝi ricevadis interalie la jenajn gazetojn: „Espero“ (Peterburg), „Movado“ kaj „Agitanto“ (Kronŝtadt), „Bulteno“

(Vjatka), „Homela Esperantisto“ (Homel), „Malgrandeta Bulteno“ (Volhov), „Araneaĵo“ (Makeevka) k. a.

Laŭ iniciato de la komunistaj esperantistoj en Sofio Bulgara Esperantista Societo entreprenis kolektadon de mono (1921—1922) inter la bulgara esperantistaro por sendi helpon al la malsatantoj en Rusio, precipe en la apudvolgaj gubernioj, kies rikolton kompromitis la terura sekeco.

La faŝista ribelo de la bulgara egburgaro (en junio 1923) transformis Bulgariion en duan faŝisman landon en la mondo (post Italio) kaj samtempe nuligis la favorajn kondiĉojn por la nobla agado de la progresemaĵoj esperantistoj. La senkapigo de la ministro-prezidanto Al. Stambolijski estis signalo por amasaj kaj kruelaj persekutoj de la plej bonaj gefiloj de nia popolo. Por Esperanto-movado venis malfacilaj tagoj.

Canko MURGIN.

## PANAJOT KOLEV — REDAKTORO DE „BULGARA ESPERANTISTO“ 1919—1924

Panajot At. Kolev, filo de la konata multjara gimnazia profesoro Atanas Kolev, naskiĝis en Târnovo la 23-an de februaro 1891. Li studis matematikon ĉe la Sofia Universitato. En 1909, kiel studento, li jam estas esperantisto. En 1910/11 li estis kasisto de la Studenta Esperantista Grupo, kaj en 1911/12-ĝia sekretario. Post tio li veturis al Prago, kie li studis agronomion ĝis la komenco de la Unua Imperiisma Mondmilito, sed li ne finis siajn studojn, ĉar lia patro revokis lin hejmlanden.

Panajot Kolev partoprenis la militojn kiel rezerva oficiro. En la unua mondmilito ĉe la meandro de rivero Cerna en Makedonio li estis rotestro.

Post la fino de la milito P. Kolev partoprenis vigle en la esperantista movado. Li estis membro de la Centra Komitato de la Bulgara Esperantista Asocio de aŭgusto 1919 ĝis aŭgusto

1927 kaj estis seninterrompe unu el la redaktoroj de gazeto „Bulgara Esperantisto“ (1919—1924). Li estis ankaŭ kasisto de la Asocio kaj de septembro 1924 ĝis majo 1927 sekretario-kasisto. Iom da tempo li instruis Esperanton en la lernejo de la blinduloj en Sofio kaj gvidis multnombrajn kursojn por ge-civitanoj. Jen kion skribas Meleško Ŝiŝkov pri li:

„En la aŭtuno de 1921 mi enskribiĝis en la Esperanto-kurso por komen-cantoj. Kursgvidanto estis P. Kolev. De tiu tempo mi ekkonis lin. Li estis bona instruanto. Ĉiam li estis akurata kaj bone preparita. Post la fino de la kurso li varbis min kiel membron de la esperantista societo kaj konatigis al mi la malnovajn esperantistojn. Mi regule kontaktis kun li kaj kun aliaj esperantistoj por praktiki la lingvon.“

Jam en la daŭro de la kurso mi havigis al mi unu ekzempleron de gazeto „Sennacieca revuo“. De ĝi mi ekkonis, ke ĵus estis fondita Internacia Laborista Esperantista Organizaĵo-SAT. Kiel nova esperantisto mi ne povis klarigi ĉion al mi kaj ofte mi demandis kamaradon Kolev. Li klarigis al mi plej detale, ke ekzistas du internaciaj organizaĵoj: UEA kaj SAT. Ĉi okaze li menciis, ke ne estos malutile se ankaŭ ni fondus laboristan societon. Ne post longa tempo mi estis invitita de li al kunveno en la Sindikata Domo sur strato Kiril kaj Metodij, Sofio, kie venis ankaŭ aliaj kamaradoj. Post la donitaj klarigoj de P. Kolev, St. Nenkov kaj Angel Nikolov ni unuanime decidis fondi Komunistan Esperanto-Grupon „Balkana Liberiga Stelo“.

P. Kolev fariĝis sekretari-kasisto de la grupo. Ni sendis la protokolon pri la fondo de la grupo al la Centra Komitato de Bulgara Komunista Partio kaj ni petis ĝian sankcion. Ne post multe da tempo ni ricevis leteron, per kiu oni sciigis al ni, ke nia peto estas kontentigita, ke nia grupo estas aprobita kun la sama nomo kaj ke ni havas rajton eldoni propagandajn materialojn.

P. Kolev estis komisiita prepari la materialojn por la unua broŝuro kiun ni sukcesis aperigi nur dank' al la komunaj klopodoj kaj kontribuoj de ĉiuj membroj de la grupo“.

Do, P. Kolev estas unu el la iniciatintoj por la fondo de la grupo „Bal-

kana Liberiga Stelo“ kaj aŭtoro de la broŝuro „La internacia lingvo kaj la laborista klaso“.

P. Kolev partoprenis en multaj naciaj kaj internaciaj esperantistaj kongre-



soj, pri kiuj li verkis interesajn artikolojn en la esperantistaj gazetoj.

Sub la forta premo de „neŭtralaj“ Esperanto-gvidantoj li estis la unua viktimo de la asocia „purigo“ (1927) de la komunista influo. Ankaŭ aliaj progresemaj esperantistoj estis persekutitaj kaj forigitaj pli malfrue el la asocio.

P. Kolev mortis la 15-an de aprilo 1953 en Sofio.

Devo de nia generacio estas profunde esplori la komunistan Esperanto-agadon de P. Kolev kaj konigi ĝin al la esperantistaro.

I. S.

**Karaj gesamideanoj,  
Lernu la historion de la esperanta movado en Bulgario! Ĝi estas neelcerpebla fonto de scioj, morala forto kaj inspiro.  
Esploru la agadon de la progresemaj esperantistoj en via urbo aŭ vilaĝo kaj prezentu la rezultojn al la Centra Komitato de Bulgara Esperantista Asocio!**

## ĈU ESPERANTO ESTAS UTOPIO

La konservativa penso obstine pravas, ke Esperanto estas utopia projekto. La vivanta, leĝkonforme evoluanta realo, ne rapidante, sed ĉiam pli decide, refutas la konservativulojn.

Antaŭ kvardek jaroj la plejmulto de la homoj konsideris la elektro-energion sektaneca elpenaĵo kaj freneza utopio; antaŭ dudek jaroj oni konsideris la aernavigadon utopio; la telefono estas ankaŭ unu el la „utopioj“, realigitaj de la homa menso; la sendrata telegrafo estis ankaŭ konsiderata frenezajo.

Sed, gajnante en la batalo kun la sekretaj naturfortoj venkon post venko, nia senlaca menso fariĝas ĉiam pli kuraĝa kaj starigas por solvado ĉiam pli „utopiajn“, ĉiam pli „frenezajn“ projektojn kaj problemojn.

La plej bonaj homoj de Rusio penas efektiviĝi la plej frenezajn „utopion“ — la starigon de la socia justico en la mondo, kaj ja oni ne povas diri, ke iliaj penoj estas senrezultaj.

La historio de la kulturo elokvente parolas al ni, ke la plej sentimaj gvidantoj de la homaro sukcesis efektiviĝi ne malmultajn utopiojn kaj ĉiam pli ofte tiuj ĉi frenezaj revoj fariĝas laborhipotezoj de la scienco.

Nun al la efektiviĝo de la utopio aliĝas miloj kaj milionoj da homoj, kaj la unueca, internacia lingvo estas pli ol iam ajn necesa al la homaro.

Se ni nur dezirus, ni povus multon fari. La neceso de unueca lingvo por la internacia proletaro venas de la unueco de la klasaj deziroj kaj celoj de la proletaro.

Laŭ mia opinio Esperanto estas sana kaj tute karabla pluevolui ĝermo de lingvo internacia. Jam nun Esperanto havas sufiĉe vastan literaturon kaj ĝi estas tre sukcese prilaborata teorie. Tiu ĉi laboro ekmarŝus multe pli sukcese kaj pli rapide, se al ĝi estus alti-

rataj scienculoj — filologoj inter tiuj, kiuj estas konvinkitaj pri la heceso de la unuigo de la homaro.

Oni diras: „La lingvo ne disvolviĝas artefarite“.

Mi ne estas esperantisto sed mi scias, ke tiu ĉi atrefarita lingvo, evoluante sufiĉe rapide, fariĝas tute natura fenomeno ĉar ĝi respondas al la neceso ankaŭ por la nuntempuloj trovi, krei komune komprenatan lingvon.

En 1910 mia konatulo Aleksej Semenovič Jakutskij traveturis tutan Eŭropon, konante eĉ nek unu eŭropan lingvon kaj parolante nur Esperanton, sed li tion faris por persone kontroli en kia grado estas disvastigita „la artefarita“ lingvo.

En preskaŭ ĉiu pli-malpli granda urbo de Eŭropo li trovis organizojn de esperantistoj, hotelojn por ili, gazetojn, literaturon, — precipe riĉa je tiaj organizoj estas Italio kaj la havenurboj de la Mediteraneo.

Mi estas profunde konvinkita, ke la organizita volo de la amasoj estas plene kapabla transformi la „artefaritan“ lingvon en naturan.

Sed ĉu nia tuta kulturo ne estas fenomeno „artefarita“?

Tamen jen ni ĝisatendis la tempon, kiam la nekultura homo ŝajnas al ni fenomeno malamika al niaj celoj, malhelpilo en la progreso de la plua kresko de la kulturo.

Por la triumfo de la kulturo ni faras revolucion, elspezas ĉiujn fortojn de nia menso, por nia celo ni oferas nian personan liberon, nian vivon.

Ĉu oni povas nei, ke lingvo, unueca por ĉiuj, donos potencon impulson al la proceso de la kultura evoluo?

Oni ne povas. Do oni devas rekoni, ke estas necese krei kaj evoluigi, tian lingvon.

1919



**SUR PINTO BUZLUĜA**

Frumatene for al horizonto  
la ĉielo estas pure hela,  
jam vekigās de la dorm' la monto  
sin en oro banas fon' ĉiela.

Sur la pint' zefira vento blovas,  
kaj rakontas al la densarbaro,  
ke en ĝi eternan pacon trovis,  
la hero' legenda en amaro.

Sur la tombo lia roz' ne floras,  
pastra preĝ' neniam ĝin atingas,  
nur ĉielo ofte sur ĝi ploras  
kune kun la am' popola digna.

Kaj vespere vento lin priplendas,  
blovetante preter tombo fama  
kaj saluton foran al li sendas,  
de l' popol' libera kaj pacama.

NIKOLA KOLAROV  
Kazanlāk

**DIMO MALJUNA BANDANO**

Bulgara popola kanto

Dimo maljuna bandano  
meze de l'korto sidadis,  
en kort' sub blanka rozujo  
kaj blankan brandon trinkadis, —  
kaj al arbaro parolis:

„Arbaro, verda arbaro,  
ĉu scias, ĉu vi memoras  
kiam mi en vi vagadis  
kun tricent junaj bravuloj  
dum mia bela juneco?“

En rozuj' ĉirpas birdeto:  
„Dimo, maljuna vojevodo,  
se la arbaro parolus  
en ĝi ne estus ŝafistoj,  
en ĝi ne hokus hakistoj,  
kaj ĝi ne kaŝus hajdutojn!“

Tradukis: P. M. PENEVSKI  
Dimitrovgrad

**BONVENIGO**

(Al la alilandaj delegitoj,  
vizitontaj niajn kongresojn)

Bonvenu fratoj, nian landon!  
Bonvenu, gastoj, karaj vi,  
El foraj kaj proksimaj landoj  
ĉi tien ĝoje venu vi,  
la sun' ja kie brilas pli!

Ho brilu, brilu, suno mia,  
kaj vi, stel' verda en la kor'!  
Kaj ni al Zamenhof genia  
dankeme klinu kun honor'  
en tiu ĉi solena hor'!

Plenumos ni devizon fian —  
por pac' batali kun obstin'  
kaj venkos ni militon fian:  
sur tero regos pac' sen fin'  
kaj sole amo ligos nin!

Bonvenu nian landon, fratoj!  
Bonvenu, kongresanoj vi  
kaj gastoj foraj, atendataj!  
Bonvenon diras ni al vi,  
ĉar nun la suno brilas pli!

Rosica GEORGIEVA  
Pazarĝik

Penco SLAVEJKOV

**DUM LA JUNECO**

Dum la junec' radias sun el or'  
en oraj revoj lulas sin la kor'.  
Dum juna aĝo estas voj' seĝpena —  
facile la vivbatojn ni eltenas.

Juneco estas ŝerco, rid', festen',  
ne ombas koron tiam la ĉagren'.  
Eĉ malĝoj' font' estas de gajeco —  
dum juna aĝo, ah, dum la juneco!

Tradukis:  
Simeon M. SIMEONOV

## LA OKA DE MARTO

Baldaŭ la bulgaraj virinoj festos la 8-an de Marto — la internacian tagon de la progresemaĵoj virinoj en la tuta mondo.

Oka de Marto naskiĝis kiel iuternacia virina festo antaŭ 51 jaroj, de la unua internacia renkontiĝo de la socialdemokrataj virinoj, en 1910. Tiu ĉi festo seninterrompe dum longaj jaroj kreadis historiajn tradiciojn kaj helajn figurojn de batalantaj virinoj.

Je la 8-a de Marto 1917 la laboristinoj en Petrograd eliris sur la stratojn por demonstracii kontraŭ la sanga burĝa reĝimo; ilia sango markis la komencon de la Granda Oktobra Revolucio, kiu liberigis la popolojn en la vasta rusa imperio kaj starigis la novan socialisman ŝtaton. La signifo de la Internacia virina tago pligrandigis precipe post la Dua Mondmilito, kiam sur la socia sceno aperis ankoraŭ multaj liberaj socialismaj landoj, kie same kiel en Sovetunio la virinoj fariĝis jam liberaj kaj egalrajtaj civitaninoj. Nome en la socialismaj landoj estis kreitaj kondiĉoj por aktiva partopreno de la virinoj en la politika, ekonomia kaj kultura vivo de la lando. Kaj miloj da virinoj donis sian kontribuon en la batalo por elradikigi la restaĵojn de la ekspluatanta klaso, por konstruo de la nova socialisma ŝtato kiu iniciatis kaj efektivigis multajn entreprenojn por defendo de la interesoj de virinoj kaj infanoj.

La virinoj en la kapitalismaj kaj koloniaj landoj daŭrigas la batalon por nacia liberigo, por egaleco kaj politikaj rajtoj. Centoj da heroinoj oferis sian vivon en tiu glora batalo. La iamaj sklavinoj de Azio, Afriko, Ameriko k. a. kurage laŭtigas sian voĉon kaj unuigas por komuna batalo.

La virinoj el la socialismaj landoj festas la 8-an de Marto streĉante siajn fortojn por plenumo de la planoj en fabrikoj, oficejoj, entreprenoj, k. t. p. Kaj pri kiom multe da atingiĝoj povas raporti

la virinoj de la socialismaj landoj. Jen en Bulgario en la iama malriĉa postrestinta Bulgario hodiaŭ la virinoj estas fieraj pri siaj grandaj sukcesoj en urboj kaj vilaĝoj . . . Jen kamaradino Manja Enĉeva depost dek jaroj estas direktorino de Fabriko „Pobeda“ (Venko) kaj lerte gvidas la tutan laborprocedon. Ŝin helpas kaj subtenas centoj da gelaboristoj, konsciaj kaj kleraj. La bulgarino per sia sindona laboro gajnis jam ĉiujn postenojn, kiuj antaŭe estis destinitaj nur por viroj. Ĉe ni ne estas jam alfabetoj. En nia lando kiel fungoj elkreskis centoj kaj miloj da infandomoj, infanĝardenoj, gimnazioj kaj universitatoj, en kiuj studas preskaŭ 50,000 gestudentoj, k. t. p.

En la unuaj jaroj post la milito, la kamparanoj estis en la unuaj vicoj de organizantoj de la unuaj terkulturaj kooperativoj. Per sia laboremo kaj persisteco ili altiris novajn kamparanojn, kiuj komence ankoraŭ ne fidis je la novaj entreprenoj. Nun la tuta bulgara agrikulturo estas kolektiva, kooperativa, malaperis la kadukaj dometoj kaj anstataŭ ili elkreskis kokete blankaj belaj domoj. En ĉiu vilaĝo oni konstruas kaj organizas akuŝejon, vartejon, kuracisto senpage kuracas, elektro lumas en ĉiu domo.

En la kamparo aperis novaj vitujoj, novaj arbaroj kaj fruktĝardenoj, por ke oni surŝutu nian landon per amaso da kamparproduktoj kaj produktoj por nia nacia industrio kaj eksporto.

En tiu nobla batalo la bulgaraj virinoj kune kun la viroj gajnas venkojn, akiras laŭrojn, kaj edukas la novan generacion — la morgaŭajn konstruantojn de la komunismo ĉe ni.

Kaj la bulgaraj esperantistinoj ne postrestas. Spertintaj la pezan kontraŭfasisman batalon per Esperanto ili konigas al siaj malproksimaj amikinoj niajn atingiĝojn, niajn sukcesojn, niajn aspirojn por defendo de la paco. Ĉiuj

sur sia posteno en fabrikoj kaj uzinoj aŭ sur la kamparo ni, la esperantistinoj, plenumas kaj estonte plenumos nian patrolandan kaj internacian devon.

Kun tia firma kredo, starante sur posteno, la bulgaraj virinoj atendas la internacian virinan tagon la 8-an de Marto, salutante siajn proksimajn kaj malproksimajn amikinojn, etendas siajn

manojn trans maroj kaj montaroj por komuna batalo por paco kaj pli bona estonteco de la infanoj de ĉiuj popoloj, de ĉiuj rasoj.

Vivu la 8-a de Marto!

Vivu la Federacio de la Demokrataj Virinoj!

Vivu la paco inter ĉiuj popoloj!

Tinka LAKOVA

## PRI LA HISTORIO DE MEM

La Prezidanto de la Mondpaca Esperantista Movado (MEM) — k-do C. Murgin sendis cirkuleran leteron al la Komitatanoj, Landperantoj kaj aktivuloj de MEM en kiu estas starigitaj la demandoj pri laŭplana agado de la landaj MEM-sekcioj kaj pri verkado de Historio de MEM. Interalie oni legas:

„Ĉiu landa sekcio de MEM devas kion eble plej detale plani sian agadon en 1961, sed samtempe per niaj kolektivaj klopodoj ni devas starigi kelkajn taskojn pli grandajn. Per ilia solvo ni sukcesos plifirmigi la pozicion de nia movado inter la esperantistaro, ni varbos novajn adeptojn al MEM kaj niaj batalvicoj plidensigos.

Unu el la solvendaj taskoj estas verki historion de MEM okaze de la 10-jara datreveno de ĝia fondigo. En septembro 1963 ni aranĝos solenaĵojn por dece celebri tiun gloran datrevenon. Estus tre bone, se la „HISTORIO DE MEM“ aperus en la printempo de 1963. Ne estas hazardo, ke en multaj lingvoj ekzistas proverbo: „Historio estas instruisto de la popoloj“. En tiu verko devas partopreni ĉiuj fondintoj de MEM. Ili aperigos siajn rememorojn, oni povas publikigi la interŝanĝitajn leterojn, dokumentojn, malnovajn fotografaĵojn, ktp. En specialaj artikoloj oni povas pritrakti la disvastigon de la reto de MEM-perantoj, starigon de la apartaj MEM-sekcioj, evoluon de la organizaj formoj kaj labormetodoj, plibonigon kaj

disvastigon de nia amata organo — „Paco“. Eble estus bone, se la Komitato de MEM elektus respondeculon, kiu redaktos la materialojn aŭ ni povus komisi tiun taskon al la Centra Redaktoro — k-do G. Holmkvist. La unuajn artikolojn iom post iom ni aperigos en la paĝoj de „Paco“. Certe ek de la septembra numero 1961 ni devas enkonduki novan rubrikon (ekzemple: „El heroa pasinteco“). El la paĝoj difinitaj por la internacia materialo ni devas dediĉi unu al la historio de MEM.

Samtempe la landaj sekcioj de MEM kiuj laŭvice eldonas la gazeton devas aparte dediĉi almenaŭ unu paĝon al la samaj problemoj en landa skalo. Landaj MEM-sekcioj devas elekti redaktoron de siaj historiaj materialoj. Li (aŭ ŝi) krom tio serĉos kapablajn kaj verkemajn pacamikojn al kiuj li (ŝi) donos taskojn aŭ temojn. Tiu kolektiva studo donos abundan materialon al la estonta historiisto de nia movado. En la fino de 1962 ni povus elekti la plej interesajn artikolojn, materialojn, dokumentojn, fotojn, kronologion de MEM ktp. akompanitaj de unu resuma artikolo „Dek jaroj de MEM — agado“ kaj aperigi ilin en aparta libro. Tiu libro havos la taskon prezenti nin al la ekstera mondo. Nia movado estas humana kaj optimisma. Tio gajnas la korojn de la esperantistoj kaj se ankokaŭ multaj ne aliĝis al ĝi tio estas rezulto dank' al tio, ke oni ne konas nin bone.“

## ULTRAVIOLETA RADIADO KIEL PROFILAKTIKA RIMEDO KONTRAŬ LA GRIPO KAJ KATAROJ DE LA SUPRAJ SPIRVOJOJ

Gripaj epidemioj aperas periode je ĉiuj 2—4 jaroj, la pandemioj — je ĉiuj 15—30 jaroj. Por kelktempo ili povas paralizi la ekonomian kaj socian vivon. Ili kaŭzas grandajn materialajn perdojn, morton de multaj homoj kaj al ceteraj komplikas la ĝeneralan sanstaton.

Por antaŭgardo kontraŭ la gripo estas atentindaj du profilaktikaj aranĝoj — la imunado kontraŭ la gripo kaj ultravioleta (uv) radiado de la homa korpo per suberitemaj dozoj, kiuj dum la epidemio aŭ antaŭ senpera ĝia apero povas en mallonga tempo malpliigi en konsiderinda grado la procenton de la gripaj malsaniĝoj kaj iliaj komplikaĵoj

La Scienc—Esplora Instituto pri Kurortologio kaj Fizioterapio en Sofio komisiis al la aŭtoro dum la granda gripa epidemio, en 1952, efektiviĝi, por unua fojo en Bulgario explore amasan profilaktikan uv- radiadon al la laboristoj en du sofiaj uzinoj, apogante sin al la soveta sperto. La ricevitaj rezultoj estas la jenaj:

1. La radiitoj malsaniĝis de gripo meze 2—3 foje pli malmulte ol la neradiitoj.

2. Tiuj el la radiitoj, kiuj malgraŭ tio malsaniĝis, malsanis malpli peze (inter ili ne estis komplikaĵoj) kompare kun la malsanuloj neradiitaj. La lastaj malsanis pli longe kaj kun diversaj komplikaĵoj.

3. La perdoj de labortagoj pro malsano (por kuracado de gripo) estis meze 1,3—2 foje pli granda ol ĉe la malsanuloj neradiitaj.

Tiu ĉi profilaktika metodo aplikita pli malfrue al la kataroj de la supraj spirvojoj donis la samajn rezultojn. Nun oni komencis ĝin enkonduki en bulgariaj entreprenoj, oficejoj kaj lernejoj. Oni devas radiadi dufoje dum la jaro — en novembro (kaj komenco de decembro) kaj en februaro (kaj la komenco de marto.) Ni rekomendas la jenan kuracmetodon:

La radiadon oni faras per argonohidrargo-kvarca (kvarca) lampo sur la nuda haŭto brusta kaj dorsa ĝis lumbo je distanco de 70 cm. inter la brulilo de la lampo ĝis la radiata surfaco, kaj en la nazo-faringo, aparte en ĉiu naztruo, kaj la faringo per alumina tubuso kun ŝanĝeblaj finaĵoj kiujn oni sterilizas en bolanta akvo, kiu estas fiksita ĉe la truo de la lampa metala kovrilo, longa 25 cm.

Dum jam ekzistanta gripa epidemio estas sufiĉe fari radiadon 3 tagojn sur la ĝislumbe nuda homo antaŭe kaj malantaŭe: unuan tagon po 1 min., la duan — po 2 min. kaj la trian — po 3 min. Samtempe oni radias per la tubuso la nazo-faringon — po 1—3 min.

Dum antaŭepidemia tempo oni faras ĝis 6—10-oble saman radiadon sur la ĝislumbe nuda homo po 1 ĝis 6 min., kaj de la 1-a ĝis la 10-a fojo restas ĉiutage po 6 min. La nazo-faringo — de 1 ĝis 3 min., kaj de la tria tago ĝis la fino de la kurso po 3 min.

Ĉe la minejoj en nia lando, post tiuj ĉi miaj esploroj, estas organizitaj tielnomitaj „fotarioj“ por amasa radiado de la ministroj, kiuj post la fino de sia laboro kaj banado trapasas nude la ejon, kie estas laŭlonge vicigita serio da kvarcaj kaj soluksaj lampoj, post kio oni vestas sin. Tiel ili rekompencas sian lummalsaton. La rezulto estas malaltigo de la malsaneco kaj plialtigo de la laborkapablo.

Tiuj zorgoj por niaj laboristoj antaŭ nia popola revolucio ne estis eblaj. Nun nia socialisma registaro faras grandajn elspezojn por la sano de ĉiuj civitanoj en nia lando. La kuracado estas senpaga kaj la profilaktikaj entreprenoj estas fundamenta zorgo de nia Ministerio de la Popola Sano kaj Sociaj Asekuroj.

D-ro T. TODOROV

## NIAJ TASKOJ

Ĉe la Bulgara Esperantista Asocio ekzistas Medicina Sekcio ek de 1957. Ĝi sentas pli kaj pli akre la bezonon de organizita kaj vigla laboro.

La sekcia estraro estas ĝoja, ke ĝi havos eblecon aperigi materialojn pri ia vivo de la sekcio en la paĝoj de „Bulgara Esperantisto“. Ĉiuj medicinistaj esperantistoj devas kompreni, ke ni povos labori per kaj por Esperanto, se ni havas serioze organizitan sekcion. En nia lando ekzistas granda nombro da medicinistaj esperantistoj, kiuj ankoraŭ ne estas organizitaj en nia Medicina Sekcio. Iuj eĉ ne scias pri ĝia ekzisto. La estraro de la Sekcio konstatas, ke ĉiuj invititoj tuj akceptis kun ĝojo esti membroj kaj labori en la Medicina Sekcio. Jen pro kio nia fundamenta tasko nun estas ke ni eltrovu ĉiujn medicinistajn esperantistojn kaj ilin organizi en la Medicina Sekcio. Poste ni devas plivigliĝi iliajn iniciatojn. En la Medicina Sekcio nun rajtas membri ĉiuj medicinistaj esperantistoj — kuracistoj, dentistoj, veterinaraj kuracistoj, helpkuracistoj, farmaciistoj, helpfarmaciistoj, medicinaj flegistinoj kaj aliaj medicinistoj en nia lando: ĉu per la lokaj societoj, ĉu rekte al BEA.

Alia grava tasko estas efektiviĝi internacian kontakton de niaj medicinistaj esperantistoj kun la samfakuloj en la tuta mondo. Ni utiligos Esperanton pli bone, se ni praktike uzos ĝin en niaj internaciaj rilatoj, se ni interŝanĝos spertojn pri nia profesia laboro kaj informante nin reciproke pri la plej novaj atingiĝoj de la nuntempa medicino.

Ni publikigos koncizajn resumojn de gravaj medicinaj artikoloj kaj aliaj materialoj, recenzojn kaj bibliografiajn informojn pri aperintaj medicinaj verkoj. Pri la atingiĝoj de la bulgara medicino ni publikigos specialajn artikolojn.

Ni certe sukcesos efektiviĝi tion, kion ni skizis pli supre, se ni ricevos helpon kaj subtenon de la bulgaraj kaj alilandaj medicinistoj.

Ni ankaŭ aperigos adresojn de bulgaraj kaj alilandaj medicinistaj esperantistoj dezirantaj korespondi en Esperanto kaj en aliaj lingvoj pri medicinaj temoj. Ĝis nun la Estraro mem de la Medicina Sekcio disdonadis ricevitaĵajn adresojn de medicinistoj precipe el Sovet-Unio por korespondado.

La ekzisto de nia Medicina Sekcio estas bone taksata en alilando kaj precipe en la socialismaj landoj. Estas multaj medicinistaj esperantistoj el Sovet-Unio, kiuj volas kunlabori kun nia Medicina Sekcio. Ni esperas la kunlaboron ankaŭ de la medicinistaj esperantistoj el la ceteraj landoj.

La Sekcio estas en konstantaj rilatoj kun la Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio kaj regule informas siajn membrojn pri ĝia laboro.

La Estraro de la Medicina Sekcio ĉe BEA klopodos unue per la paĝoj de „Bulgara Esperantisto“, sed iom poste laŭ la bezonoj ĝi eldonos bultenon por ke ni povu organizi pli efike la laboron de la sekcio.

Ĉiuj medicinistaj esperantistoj en nia lando estas petataj aliĝi al la Medicina Sekcio kaj partopreni en la vivo de la lokaj esperantistaj societoj, kreante grupojn de medicinistaj esperantistoj kaj altirante novajn membrojn. En tiu ĉi laboro ili plibonigos siajn lingvajn konojn kaj konatigos kun la esperantista movado en Bulgario kaj en alilando.

Niaj medicinistaj esperantistoj devas partopreni aktive en la vivo de nia esperantista movado, ĉar ili havas grandan prestiĝon antaŭ la larĝaj popoltavoloj. Ili devas partopreni en niaj landaj kaj internaciaj Esperanto-kongresoj. Tiamaniere ili ankaŭ helpas al nia Medicina Sekcio metante Esperanton en serioza praktika uzado.

Nia Sekcio havas brilan perspektivon kaj ni kredas, ke ni forigos la malfacilaĵojn en ĝia vojo antaŭen.

Per Esperanto por la mondpaco!

LA ESTRARO  
DE LA MEDICINA SEKCIO

En gazeto „**Filatelen pregled**“ n-ro 9 (septembro 1960) aperis longa kaj bone argumentita artikolo „**Esperanto kaj filatelio**“ de I. N. Daskalov kaj informo „**Novaj poŝtmarkoj en Esperanto**“ (temas pri du poŝtmarkoj aperintaj en Pollando).

En ĵurnalo „**Transportna iskra**“ — Sofio (30. 11. 60) — artikolo — „**Ekspozicio de la Esperanto-Societo „Prin-tempo**“ de P. Dimitrov kun bildo de la ekspozicio.

En ĵurnalo „**Orjahovska tribuna**, duobla numero 22—23 (decembro 1960) — artikolo „**La unua konstruado en la unua somerrestadejo ĉe Danubo**“ de Cv. Markova. La aŭtorino rakontas pri la konstruado sur insulo „**Esperanto**“ apud urbo Orjanovo, konata jam al multaj esperantistoj.

En ĵurnalo „**Stalinec**“ — Dimitrograd (14. 12. 1960) — artikolo „**1859 — L. L. Zamenhof — 1960**“ de G. Nedelĉev kun portreto de nia Majstro.

En ĵurnalo „**Ikonomist**“ N-ro 61 — Sofio (24. 12. 1960) — artikolo „**Kantoj por la paco**“, en kiu oni informas pri la kvara eldono de „**Kantoj por la**

paco“, poemaro de Canko Murgin kaj pri lia strebo enkonduki Esperanton en la Ekonomian Instituton „**Karl Marks**“ en Sofio.

En ĵurnalo „**Kolarovgradska borba**“ n-ro 1 (3. 1. 1961) — artikolo „**Esperanto malfermis al ili fenestron al la mondo**“ de A. Laborov kun bildo, kiu prezentas la gelernantan kurson de R. Kasabova en Kolarovgrad.

En ĵurnalo „**Patrolanda fronto**“ — Sofio (4. 1. 61) — artikolo „**La argenta bordo**“ — moderna somerrestadejo apud Danubo“ de Vl. Najdenov kun bildo de la nova turista domo. La aŭtoro rakontas pri la nove konstruita rivera somerrestadejo apud la bordo de Danubo oriente de Orjahovo proksime al insulo „**Esperanto**“ kaj aliaj danubaj insuloj.

En ĵurnalo „**Septemvri**“, n-ro 2 — St. Zagora (5. 1. 1961) en rubriko „**Esperanto-sciigoj**“ aperis du informoj — „**101 jaroj de la naskiĝo de L. L. Zamenhof**“ pri la solena kunveno kun prelego de C. Murgin pri la Majstro kaj „**Monda forumo de la junularo**“ (okazonta dum la somero en Moskvo).

## VORTAROJ DE ESPERANTO

La bulgara-esperanta vortaro estas en presado. Estas jam presita kvarono de ĝi. Certe post 5—6 monatoj ĝi jam estos aĉetebla. Ĝi ampleksos ĉirkaŭ 650 paĝojn.

La CK de BEA komisiis al kolektivo de 4 samideanoj (Dim. Simeonov, Sim. Hesapĉiev, Kiro Georgiev kaj Iv. Sarafov) ellabori grandan esperanto-bulgaran vortaron. La kolektivo estas gvidata de la redaktoro At. D. Atanasov — Ada. Estas farita jam kontrakto kun la Ŝtata Eldonejo „**Nauka i Iz-kustvo**“, kiu enskribis la verkon en sian planon por 1962.

En privata letero de la 28. IX. 1960, adresita al At. D. Atanasov-Ada, la

elstara sovetlanda samideano Prof. E. Bokarev skribas interalie: „**La nuna jaro estis por mi tre malfacila: ne nur oficaj kaj sciencaj taskoj postulis de mi senĉesan laboron, mi devis ankaŭ multan tempon dediĉi al rusa-esperanta vortaro. Kaj feliĉe la manuskripto estas jam preta. Restas ankoraŭ laboro pri esp.-rusa vortaro**“.

La bulgaraj esperantistoj certe atendos la aperon de tiuj du vortaroj kun ne malpli granda malpacienco ol la rusaj. Sciante la grandan popularecon de la rusaj libroj en nia lando ĝenerale, ni povas atendi ke tiuj ĉi vortaroj estos tre utilaj al niaj bulgaraj samideanoj.

La sekretario de BEA Violin Oljanov okaze de la jarkunvenoj vizitis multajn societojn en la lando.

En Dimitrovgrad okazis sukcesa jarkunveno de s-to „Internacia Amikeco“ kun ĉeesto de 45 ges-anoj. La kunvenon sekvis tre bela kaj amika renkontiĝo inter la geesperantistoj en Dimitrovgrad kaj Ĥaskovo. Ludis amatora ĝazo. La mastroj surprizis la gastojn per bongusta vespermango. Bone estus, se la renkontiĝon partoprenus la societoj en vilaĝo Uzunĝovo, Pĉrvomaj, vilaĝo Ljubimec, Ĥarmanli k. a., kiuj situas proksime al Dimitrovgrad. Tio instigus ties plivigliĝon.

Grava manko en la agado de la estraro de s-to „Internacia Amikeco“ estas, ke la laboro ne estas egale distribuata inter ĉiuj estraranoj kaj aktivuloj. La sekretario deziras ĉion mem fari kaj pro tio la laboro en iuj sektoroj lamas.

La asocia sekretario Oljanov gastis ankaŭ al s-to „Flamo“ en la ĥemia uzino „Stalin“. Li renkontiĝis kun la gvidantoj de la uzinaj sociaj organizaĵoj kaj preparolis la formojn de helpo al la esperantista s-to: kunvenejoj, subvencio, loko en la uzina gazeto k. a.

En Svilengrad la kunveno estis bone vizitita — ĉ. 30 personoj. Ĉeestis ankaŭ la prezidanto de la Urba Komitato de la Patrolanda Fronto kaj la vicprezidanto de la Urba Popola Konsilantaro. La kritiko al la malnova estraro estis akra. Ĝi ne utiligis ĉiujn eblojn. Ne estas sufiĉa la laboro inter la gejunularo. Nun estas elektita pli esperiga estraro, en kiun eniris ankaŭ junulo.

La agado de la gesamideanoj en Ljubimec dum la jaro estis modesta. Sed ili bone organizis la jarkunvenon kaj tio estas antaŭsigno pri plivigliĝo de la societo. Ĉeestis 28 personoj inter kiuj konsiderinda nombro da gejunuloj. Gejunuloj nun konsistigas la pliparton de la estraro.

En Poljanovgrad oni ne sukcesis amasigi la societon, malgraŭ la bonaj kondiĉoj. Ĝojinda fakto estas, ke la novan estraron eniris junulino, lernantino en la 10-a klaso, tre agema kaj bona esperantistino. Ni esperu ke tio estos komenco por pli efika kaj rezultodona propagando inter la junularo.

En Jambol ekzistas forta societo, tamen la kunvenon ĉeestis nur 30 personoj. Oni povus pli bone organizi ĝin kaj certigi la ĉeeston de pli granda plimulto de la anaro. Oni vigle kritikis la mankojn en la agado de la estraro. La nova estraro refreŝiĝis per junaj kaj entuziasmaj gesamideanoj. Oni utiligis la ĉeeston

de la asocia sekretario kaj vizitis kun li la vicprezidanton de la Distrikta Popola Konsilantaro kun peto ke oni pagu al la gvidantoj de la lernejoj esperantistaj rondoj same kiel al la gvidantoj de la aliaj ĝelernantaj rondoj. La vicprezidanto akceptis la proponon.

En Sliven estas multaj malnovaj esperantistoj, sed oni ne trovis fortojn por kunvoki en la difinita tempo jarkunvenon. La agado estas tute nesufiĉa. Ĉiuj aktivuloj plendas pri la neagemo de la prezidanto. La gesamideanoj en Sliven vidas la kaŭzojn pri la malbona stato de la societo nur en la objektivaj kondiĉoj (malbonaj!), en la manko de intereso ĉe la urbanaro kaj la junularo, sed nur ne en si mem. Kamarado Oljanov vizitis iujn el la gvidantoj de la sociaj organizaĵoj kaj preparolis ties helpon al la Esperanto-societo. La societoj en Jambol kaj samideano Aleksandĉr Blagoev, membro de CK, devas ankaŭ helpi la samideanojn en Sliven.

En Ĥarmanli la societo dum la jaro ne montris agadon. Estas multaj dezirantoj lerni Esperanton, sed la prezidanto Stoilov, kiu estas la unika bona esperantisto en la urbo, sen seriozaj kaŭzoj prokrastas la malfermon de la kurso kaj tiel kompromitas tiun gravan entreprenon, kiu donos novajn fortojn al la societo, kaj plifortigos ĝin. La sekretario kritikis la prezidanton, sed ankaŭ li ne montras viglan intereson al la sociaj aferoj. En la urbo ekzistas bonaj objektivaj kondiĉoj kaj la samideanoj devas aktivigi por stabiligi la societon.

En Ĥaskovo la samideanoj bone utiligis la ĉeeston de la asocia sekretario kaj vizitis kune kun li la Distriktan Komitaton de BKP, la Distriktan Popolan Konsilantaron, la Urban Komitaton de BKP, la Urban Bibliotekon k. a. instituciojn, en kiuj preparolis helpon al la societo (klubejo, subvencio k. a.) kaj en la propagando de Esperanto. La societo agas bone, sed la laboro devas esti distribuata inter pli da membroj de la estraro kaj aktivuloj.

La Prezidanto de la Asocio Ĥristo Gorov vizitis la jarkunvenon de societo „Kulturo“ en Plovdiv.

K-ino Bogdana Popova vizitis la jarkunvenojn de societoj en Levski, Kneĵa, Orĵahovo.

Preskaŭ ĉie la jarkunvenoj estas organizataj bone, okazas viglaj diskutoj, montriĝas pli granda aktiveco de la anaro, estas elektataj pli viglaj estraroj kun la partopreno de pli granda nombro da gejunuloj. Ni esperu, ke tio estas komenco de ĝenerala granda plivigliĝo de nia landa Esperanto-movado.

**SOFIO.** Jam estiĝis tradicio la ĉiujara okazigo de esperantaj kursoj en la Sofia Universitato. La kursojn partoprenas granda nombro da gestudentoj. Ankaŭ dum 1960 funkciis kurso kun ĉirkaŭ 45 partoprenintoj. La kurso estis gvidata de k-do Violln Oljanov laŭ la metodo de Andreo Ĉe. La sperto montris, ke inter la studentaro, inter la homoj kun pli alta klereco tiu metodo estas plej efika, la rezultoj plej bonaj. La kurso finis kun granda sukceso, la studentoj jam tre bone regas la lingvon. Multaj samideanoj el Sofio aŭ gastoj de la ĉefurbo vizitis la kurson kaj utiligis la sperton de la kursgvidanto. Je la lasta leciono al la plej bonaj gekursanoj estis donacitaj Esperanto-libroj. Laŭ iniciato de la Junulara Sekcio ĉe BEA kaj malnovaj studentaj esperantistoj post la fino de la kurso estis fondita Studenta Esperanto-Societo. Ĉiuj partoprenintoj de la kurso estiĝis membrofondintoj de la unua studenta societo en nia lando. La nova societo estis baptita per la nomo „Vela Peeva“ honore al la heroe pereinta bulgara esperantistino-studentino. La nova societo jam nombras pli ol 50 membrojn. La kunveno elektis estraron, konsistanta el plej aktivaj studentoj. Prezidanto — Aleksandăr Dimitrov, sekretario — Petăr Atanasov, membroj — Emil Keremiĉiev, Sveja Vălova kaj Tonko Tonkov — estinta membro de la sofia junulara grupo, nun lektoro en la Matematika fakultato.

**Delka Ĉolakova**

**RUSE.** Dum oktobro 1960 en multaj mezlernejoj en Ruse estis malférmitaj kursoj de Esperanto. Por krei pli grandan intereson inter la gekursanoj, la Junulara grupo ĉe la loka E-societo „Libero“ decidis organizi, kun helpo de la Urba Komitato de la Komsomolo, konkurso-festivalon inter la lernantaj kursoj. La lernantoj rapide progresis en la lernado de la internacia lingvo kaj jam en decembro komencis internacian korespondadon. Samtempe la lernantoj obstine sin preparis por la festivalo. Ili lernis kantojn, versaĵojn k. t. p.

La 25-an de decembro 1960 la salono de la Komsomolo en la urbo estis plenplena kun lernantoj-kursanoj, iliaj parencoj kaj konatuloj, malnovaj esperantistoj kaj gastoj. La studento Momĉo Momĉev koncize klarigis la celojn de la festivalo, bondeziris sukcesojn al la novaj kursfinintoj kaj rekomendis al la gastoj lerni la lingvon de la paco.

Unu post la alia aperadis sur la scenejo, la lernantoj el la kursoj de la Ekonomia Mezernejo, de la 1-a kaj V-a gimnazioj. La bona plenumo de la kantoj, de la versaĵoj en Esperanto kaj en bulgara pri Esperanto provokis multajn aplaŭdojn. La gejunuloj demonstraĉis ke ili obstine laboradis por pli alta nivelo en la posedo de la lingvo.

La konkursa jurio anoncis la rezultojn. La konkuradon gajnis la kurso de la 1-a gimnazio kun kursgvidanto M. Momĉev. Sub la aplaŭdoj de la ĉeestantoj estis transdonita la unua premio —

romano „Bofilino“ de G. Karaslavov kaj aliaj donacoj por la partoprenintoj.

**Jordan Dimitrov**

**KAZANLĀK.** La 27.12.1960 Esperanto-Societo „Roza valo“ aranĝis solenan kunvenon en la salono de la Kulturdomo „Iskra“ por festi la 101-an naskiĝan datrevenon de d-ro L. Zamenhof.

La solenaĵon inaŭguris la urba orkestro, per ludado de soveta kaj bulgara himnoj kaj de „La Internacio“ — la himno de la batalanta tutmonda proletaro.

K-do D. Martinov — prezidanto de la loka Esperanto-Societo faris enkondukan paroladon. Poste li dankis al la publiko pri la amasa vizito spite al la malbela vetero kaj donis la parolon al k-do Canko Murgin, kiu faris analizon de la sukcesa Zamenhofa strebado starigi Internacian Lingvon kaj krei originalan kaj tradukan literaturon en ĝi.

Je la fino k-do Murgin diris, ke la ordinaraĵoj homoj ĉe ni jam konas la vivon kaj verkon de nia Majstro, tial li sugestis, ke ek de la venonta jaro la plej bona rememorigo de la menciita naskiĝtago — estos raporti konkrete pri la aktiva partopreno de la Zamenhofaj adeptoj en la socialisma konstruado de nia lando.

Sekvis longa, sed arte aranĝita literatur-muzika programo, kiun la ĉeestantaro senescepte kaj malavare rekompencis per fervoraj aplaŭdoj. La organizanto de ĉi tiu vere bela programo estis k-do A. Păncev.

**Spartak Petkov**

**PLEVEN.** Dum la verda semajno la plevena esperantistaro solene festis la naskiĝadon de la kreinto de Esperanto. La 17-an de decembro 1960 nia klubo bele ornamita akceptis pli ol 60 gekamaradojn. Komence la prezidanto de la Plevena societo parolis pri D-ro L. Zamenhof. „Esperanto donas al ni veran feliĉon — diris inter alie la raportanto. — Per ĝi ni havas eblecon kontakti kun multaj diverslandaj samideanoj kaj rakonti al ili pri nia belega lando kaj ĝiaj diversflankaj sukcesoj. Ni devas esti laboremaj kaj agemaj — aldonis li — kiel nia eminenta kaj senmorta Majstro. Sindone laborante ni devas plialtigi la signifon de E-movado kaj disvastigi Esperanton meze de ĉiuj sociaj medioj en kunlaboro kun la aliaj amasaj kaj kulturklerigaj organizaĵoj“

Poste riĉa kamaradeca vespermango.

**Zdravko Velikov**

**DIMITROVO.** En la elektrocentralo „Respubliko“ estas malférmita kurso de Esperanto kun 15 gekursanoj kaj kursgvidanto k-do Sp. Nedelkov el la sama entrepreno. Notinda estas la fakto, ke por la organizo de la kurso aktive helpis la direktoro — ing. G. Stoicev kaj la sekretarioj de la komunista organizo — Kostov kaj Mihalkov.



Jen imitinda ekzemplo pri apliko de la Cirkulera letero de la CK de la Sindikatoj pri instruado de la internacia lingvo. La anoj de la societo „Nova vojo“ dankas al la menciitaj kamaradoj pri ilia serioza rilato al nia afero.

A. Vasev

**STANKE DIMITROV.** La 14-an de decembro 1960 okazis kunveno de la E-societo „Marek“. Ganuŝev faris raporton pri la Dimitrova konstitucio, pri la rajtoj kaj liberecoj, kiujn garrantias ĝi al la civitanoj de nia lando.

En la diskuto partoprenis B. Banov, B. Drenski kaj B. Mihajlov.

Pri la dua punkto de la tagordo k-do Drenski raportis pri la ricevitaĵoj cirkuleroj de BEA dum la kvara trimonato. Aparte li atentigis la ĉeestantojn pri la varbado de abonantoj al „Bulgara Esperantisto“ kaj „Paco“.

Boris Drenski

**PAZARGIK.** En la urbo funkcias kelkaj kursoj por komencantoj. La internacian lingvon lernas multaj poŝtistoj, civitanoj kaj geaktoroj el la loka teatro.

Lernantaj kursoj funkcias en du gimnazioj. Notinde estas, ke la instruantoj en la gimnazioj instruistoj estas pagataj de la ŝtato.

Petko Arnaudov

**SMOLJAN.** La loka Esperanto-societo organizis du kursojn por Esperanto en la loka gimnazio. Funkcias kurso por 9 geinstruistoj kaj kurso por la gelernantoj de la 10-a klaso.

P. G. Pamporov

**BURGAS.** La 13.12.1960 E-societo „Nigra maro“ organizis solenan kunvenon. En la bone ornamita klubejo kolektiĝis ĉirkaŭ 50 esperantistoj. Mallongan festparoladon pri L. Zamenhof kaj lia verko faris la vicprezidanto de la societo — N. Valkanov. La novaj gekursanoj partoprenis en la arta programo. Aparte sin distingis la lernanto Borisov arde deklamante „Moskvo -n“ de Ĥr. Smirnenski.

Fine 22 gekursanoj — novaj adeptoj de la Zamenhova verko estis membrigitaj al la societo.

M. Janev

**LOVEĈ.** Serena decembra tago. Zefiro karesas la vizaĝojn de la scivolemaj civitanoj, kiuj amasiĝas antaŭ la belege aranĝita esperantista ekspozicio, de la fama „Tegmentita Ponto“ en Loveĉ. Fotoj, esperantaj gazetoj kaj libroj, poŝtkartoj kaj multkoloraj afrankitaj leteroj venintaj de plej malproksimaj landoj altiras la atenton de la vizitantoj. Oni povas ekscii ankaŭ la adresojn de la lokaj esperantistoj Bliznakov k. a. — grava por la samideanaj gastoj en la urbo.

La pasantoj interparolas pri tio kion ili vidis en tiu interesa angulo, envlante tiujn felicu-

lojn kiuj scias kaj komprenas Esperanton kaj povas efektiviĝi senperajn kontaktojn kun la tuta mondo.

Rezulte multaj civitanoj aliĝis al la esperantaj kursoj por komencantoj.

K. Uzunova v. Umarevci

**POLSKI TRÁMBEŠ.** La esperantistoj en Polski Trámbeš festis ĉi jare pli altnivele kaj amase la Zamenhofan datrevenon.

Kvinfoje dum la verda semajno la loka radio-centro parolis pri Esperanto. Apartan mencion meritas la programeto de la pioniroj—esperantistojn el kvara „a“ klaso.

La solena kunveno okazis la 19.12.1960 en la kulturdomo. Estis eldonita speciala afiŝo. Sciigoj pri la kunveno aperis ankaŭ en la loka kaj esperantista gazetararo.

Pli ol 350 ĉeestantoj aplaudis la riĉenhavan programon de la vespero en kiu partoprenis la lernantaj esperantistoj, la pionira kaj la komsomola ĥoroj. La kunvenon malfermis la prezidanto de la loka Porpaca Komitato — k-do Panov. La sekretariino de la Komsomolo M. Stojanova tralegis kelkajn salutleterojn ricevitaĵajn el alilando.

Honore alla Zamenhova datreveno 45 gekamaradojn abonis al „Bulgara Esperantisto“.

Ĥristo Manolov

**PLOVDIV.** Okaze de la datreveno de la naskiĝtago de L. Zamenhof la E-societo „Kulturo“ en Plovdiv organizis la 18.12.1960 solenan kunvenon en la klubejo de la Bulgara-Soveta Komitato. En la prezidantaro estis la plovdivaj veteranoj D. Malĉev, kaj P. Stoev.

Pri la kreinto de la internacia lingvo parolis la sekretario de la societo — Kr. Sofroniev.

En la varia arta programo partoprenis multaj junaj esperantistoj kaj gelernantoj el la muzika lernejo.

Fervore laboris por la organizo de la kunveno samideanoj, Ĥr. Petrov kaj L. Sotirova.

Dum la propaganda verda semajno en multaj grandaj entreprenoj kaj oficejoj estis organizitaj propagandaj bulgarlingvaj paroladoj pri la internacia lingvo kaj ĝia kreinto.

Dimitar Ivanov

## NOVAJ SOCIETOJ

CK de BEA konfirmis tri novajn Esperanto-societojn:

123. V. Dálboki (Stara Zagora)—s-to „Marko Ivanov“ kun 35 membroj-fondintoj.

2. 124. Ruse — Fervoĵista Esperanto-Societo „Ponto de la Amikeco“ kun 47 membroj-fondintoj.

3. 125. Sofio — Studenta Esperanto-Societo „Vela Peeva“ kun 27 membroj-fondintoj.

Al la novaj societoj ni deziras rapidan kreskon kaj sukcesojn en la propagando kaj disvastigo de Esperanto.

## DEZIRAS KORESPONDI

### BULGARIO

30-jara D-ro Teodor Nedelčev, vilaĝo Kamen, distrikto de Sliven, Bulgario, deziras korespondi kun eŭropaj kaj usonaj samideanoj. Marla Grozdanova — medicina studentino, str. Kitka 14, Kolarovgrad, deziras korespondi.

### HUNGARIO

45-jara oficisto kaj lia familio (filino 9-jara, filino 15-jara deziras korespondi letere, bildkarte kun gesamideanoj en la tuta mondo. D-ro Bèla Agh, Takaréktar u. 8. II. 18. Szeged 26 gelernantoj de gimnazio — kun bulgaraj lernantoj (14—18 aĝaj). Interŝ. Skribu al: D-ro Balint Szemenyel, Hubo u. 38, Oroshava.

### USSR

Kalaŝnikov Aleksandro (militinvalido, 50-jara), Novorosijsk, Soflevskaja 5 — kun filatelistoj en ĉi; interŝ. PM, sendas novajn alu-metetikedojn kontraŭ PM.

Alberto Vernikovskij, instruisto, Omskaja. obl. Boŝereĉenskij r., s. Novo-Roĵdestvenka — kun ĉi, pri ĉt.

Boris Fedorov, ul. Nekrasova 88, kv. 32, Jaroslave 24 — pri fotado, tekniko, Interŝ. PM, IK.

A. Vasilijev, u. Makejevka — Donbas, 8 linio, 8 prospekto, domo 1/19, loĝ. 31 — pri pacaj aferoj.

### POLLANDO

Wojaed Wozrić, Dziedarowice, pow. Mysłericze — studento, kun gestudentoj pri kemio kaj kibernetiko.

Josef Piduch, Ochla 99, powiat Zielona Góra — kun novaj kaj malnovaj geesperantistoj. Interŝ. fotojn, BK. Respondo garantita.

Magdaleno Hempel, Sopot, ul. 20 października 689/1 — juna esperantistino kun gejunuloj. Pri kino, teatro kaj muziko.

Piduch Józef, Ochla 99, powiat Zielona Góra — interŝ. PM

S-ino Jadwiga Dziwlik, Krakow, ul. Boh. Stalingrada 65/3m — pri turismo. Interŝ. alu-metetikedojn.

F-ino Zofia Flaga (laboristino), str. Chodkiewiczza 9, m. 7 Krakovo — kun ĉi pri ĉt.

### ĈEĤOSLOVAKIO

Rokgrimpanta kaj turista klubo de C. Budějovice volas korespondi kun bulgaraj rokgrimpantoj aŭ turistoj pri komunaj aferoj en Esperanto, angla aŭ germana lingvoj. Skribu al: Boris David, Svatotrojiská 22, C. Budějovice.

Bohumil Král, Ottilie Králova (edzino) kaj Libuše Kralova (filino), Praha 7, ulice Komunardu 35 — kun geesperantistoj.

### FRANCIO

Esperanta Fervoĵista Grupo (40 junuloj kaj 10 plenaĝuloj) deziras korespondi kun gelernantoj el ĉi pri ĉt. Adreso: Esperanta grupo S. N. C. F. I Rue de Paris St. Etienne du Rouvrau, Seine Maritime

## NI RECENZAS

### ESPERANTA RESUMO DE LA STENOLOGIO KAJ STENOGRAFIO

de Prof. Delfi Dalmau, (Lauria 98, Barcelona, Hispanio)

La eta libreto, kun la supra titolo, kiu estas en miaj manoj, konsistas el du partoj. La unua estas „Stenologio“. En ĝi la aŭtoro pritraktas la problemojn pri la scienca fundamento de ĉiu stenografio. Observante la ĉiuspecajn stenografiajn sistemojn, kursivajn kaj geometriajn prof. Dalmau prave konstatas, ke ili kaj iliaj alfabetoj ĉiam estas konformaj al la fonetika trajtoj de tiu aŭ alia nacia lingvo, kio faras ilin pli aŭ malpli malkonformaj al la ceteraj lingvoj. Tiurilate en la libreto estas troveblaj ekzemploj kaj komparoj. La aŭtoro aparte parolas pri la konsonantoj kaj pri la vokaloj, ankaŭ donante ekzemplojn. Estas tabelo de la signoj de la konsonantoj en kelkaj lingvoj. Konklude la aŭtoro donas unu stenografian sistemon bazitan sur la internacia fonetiko kaj en la dua parto de la libreto „Stenografio“ li donas principojn kaj ekzemplojn de simbolado de la vokaloj, la konsonantaj kaj vokalajn kombinojn. Sigeloj tamen mankas kaj por pli profunda ellerno de la sistemo tiu ĉi resuma libreto ne sufiĉas, sed ĝi certe tion ne celas.

La laboro de prof. Dalmau povus esti bona fundamento por plibonigo de la naciaj stenografioj. Tiurilate konsiderinda sukceso jam estas la laboro de Kunovski „Intersteno“, por kiu tre aktive laboras la itala samideano Daljlo, Lita parodi 223, Aleksandrio.

Sed laŭ mi la vera problemo pri stenografio ankoraŭ restas nesolvita. Jam estas internacia lingvo, nia kara Esperanto kaj nur ĝia stenografio povas esti vere internacia. Bedaŭrinde ĝis nun ĉiuj Esperanto-stenografioj estas pli aŭ malpli sukcesaj, modifoj de naciaj stenografiaj sistemoj. La nun proponata surbaze de la internacia fonetiko mi ankaŭ traktas kiel modifon. Ellaborante stenografian sistemon por Esperanto ni devas konsideri la naciajn kaj la internacian fonetikon samman ere kiel laris Zamenhof laborinte sur Esperanto mem. Sed antaŭ ĉio kaj ĉefe ni devas konsideri la internacian lingvon mem kaj ĝian fonetikon, por ke ni kreu vere novan sistemon kaj ne alfabeton.

Petko Arnaudov

## AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Dum la lastaj kelkaj jaroj en la redakcian paperujon de „Bulgara Esperantisto“ amasiĝis multe da versaĵoj, noveloj, rakontoj — originalaj kaj tradukitaj—de bulgaraj kaj eksterlandaj aŭtoroj kaj tradukantoj. Kelkaj el ili estas bone verkitaj aŭ tradukitaj, aliaj estas korektataj en la redakcio, la plimulto el ili tamen estos resendotaj al la aŭtoroj aŭ tradukantoj por korekto kaj eventuala publikigo, kaj nur kelkaj ne estas taŭgaj. En plej baldaŭa tempo ni skribos al ĉiuj sendintoj pri la sorto de illaj verkoj. Intertempe la plej bonaj kaj senriproĉaj aperos en la paĝoj de „BE“.

Samtempe ni petas la kunlaborantojn de nia literatura paĝo, ke ankaŭ estonte ili vigle kunlaboru!

Ni daŭre akceptas konvenajn materialojn ankaŭ por la ceteraj rubrikoj de „Bulgara Esperantisto“.

La Redakcio

## GRAVA SCIIGO

Ĉiuj grupoj de medicinistaj esperantistoj en la lando estas petataj prepari sian raporton pri la laboro dum 1960 kaj sendi sian planon por laboro dum la unua kvarmonato de 1961.

Por plibonigi kaj plivigligi sian laboron kiel organizitaj medicinistaj esperantistoj, la grupoj kaj la apartaj membroj devas havi konstantajn ligojn kun la estraro de la Medicina Sekcio en Sofio.

Neniu, veninte en Sofion, devas perdi la okazon kontaktiĝi kun la estraro de la sekcio.

Per la sekcio la apartaj grupoj povas interŝanĝi sperton kun aliaj grupoj en la lando.

La grupoj kaj la apartaj medicinistaj esperantistoj estas petataj sendi materialojn pri sia por- kaj peresperanta laboro al la Medicina Sekcio, kiu zorgos pri ĝia aperigo en la paĝoj de „Bulgara Esperantisto“.

Ĉion por la Medicina Sekcio sendu al adreso: Medicina Sekcio ĉe BEA, bul. Dondukov 57, Sofio — BULGARIO

## NI FUNEBRAS

Je 26. XI. 1960 subite forpasis la membro de nia Medicina Sekcio Prof. Goce Tenčov — fama bulgara sciencisto — rentgenologo, edukito kaj longdaŭra profesoro de Sofia medicina fakultato.

La Medicina Sekcio de la bulgaraj medicinistaj esperantistoj perdis unu el siaj elstaraj reprezentantoj.

Ĝis la fino de sia vivo li laboris sindone kiel medicinisto en ĉiutaga servo de la homoj.

Al liaj gefamilianoj sincerajn kondolencojn!

## PER ESPERANTO TRA GDR

Ni estas du lernantoj en la teknika mezlernejo en Ruse. En novembro 1960 ni havis la feliĉon viziti Germanan Demokratian Respublikon.

Dank' al la geesperantistoj el Leipzig, Berlino kaj Dresden ni faris tre interesan, impresoplenan kaj utilan ekskurson tra la frata lando.

Estis por ni tre agrable ĉeesti en Dresden publikan kunvenon kun prelego pri Bulgario fare de nia konata samideano S. Ĥesapĉiev. Kia estis nia surprizo kiam en urbo Plauen ni denove aŭskultis prelegon pri nia lando. K-do Burgmeister, vizitinta nian landan 34-an kongreson en Târnovo, raportis kaj montris bildojn pri sia vojaĝo tra nia lando. La ĉeestantoj restis tre kontentaj kaj multaj esprimis sian fortan deziron nepre viziti nian landon en 1961.

Tiu ekskurso montris kiom utila estas la internacia lingvo kaj kiel efike ĝi servas al la plifortigo de la amikaj ligoj inter la popoloj.

Iv. Pomakov kaj J. Ĥristov

## REDAKTA KOMITATO

Canko MURGIN (respondeca redaktoro), Atanas LAKOV, Ivan SARAFOV,  
Kiril DRAJEV, Simeon D. SIMEONOV, Violin OLJANOV

Korektis : D. Ĉolakova

Formato 71×100/16

Eldonkvanto 3000 ekz

Adreso : Bul. Dondukov 57, Sofio, Tel. 7-46-01, Ĉek-konto 15/1052

Ŝtata presejo „T. Dimitrov“, filio 2 — Sofio

La plej konvena donaco  
por via eksterlanda korespondanto estas

## ELEKTITAJ VERSAĴOJ

de NIKOLA VAPCAROV

kun antaŭparolo de ĤRISTO RADEVSKI  
sub la redakto de ATANAS LAKOV

Luksa papero, broŝurita, paĝoj 72

Aĉetebla ĉe la librejoj de la Bulg. Esp. Kooperativo  
en Sofio kaj ĉe la librejoj de „Peĉatni proizvedenija“ en la  
pli grandaj urboj de la lando

Prezo 6.70 lv.

### BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

p. k. 66 — Sofia

liveras:

Malnovajn ekzemplerojn de „Bulgara esperantisto“

1958 jaro — 1—10 numero	×	1 lv.	rabato 50%
1959 „ — 2—12 „	×	1 lv.	„ 40%
1960 „ — 1—12 „	×	1 lv.	— —
Portreto „Zamenhof“ . . . . .	×	1 lv.	
Ĵurnalo „Esperanto“ . . . . .	×	0.20 lv.	rabato 50%
Jubilea ĵurn. „Zamenhof“ . . . . .	×	0.40 lv.	„ 50%
„La lernejo kaj Esperanto“ . . . . .	×	1 lv.	„ 40%
„Amika Vietnamio“ . . . . .	×	7 lv.	— —
„Sub la jugo“ — lv. Vazov . . . . .	×	17.30 lv.	

Gekamaradoj faru viajn mendojn kolektive pere de la societoj

